

LA ANĜEVA FOLIO

LA FEUILLE ANGEVINE

DU 19 AU 21 AVRIL
Visite de l'espérantiste russe
Aleksandro Melnikov

Consultez www.esperanto-angers.fr

Kelkaj vortoj

Jam aprile kaj 2015 anonciĝas same agadriĉa, kiel la jaro 2014! Dum daŭro de unu semajno, Francio fariĝos la monda centro de Esperantio julifine akceptante en Lille la universalan kongreson kun pli ol 2000 partoprenantoj el la tuta mondo! (legu p.3). Al tiu viglopleneco kontribuos nia grupo akceptante jam ĉi-monate Aleksandr Melnikov (Rusio) kaj ankaŭ Zhang Fude (Ĉinio) ekjune, kaj eble pliajn alilandajn prelegantojn. Tenu vin informatajn... interalie legante ĉi-tiun legindan bultenon!

La redakta teamo

Quelques mots

Déjà avril et 2015 s'annonce comme l'an dernier très riche en activités! Le temps d'une semaine, la France deviendra le centre mondial de l'espéranto en accueillant, fin juillet à Lille, le congrès mondial avec plus de 2000 participants du monde entier! (lire p.3). Notre groupe contribuera à cette effervescence en accueillant dès ce mois-ci Aleksandr Melnikov (Russie) ainsi que Zhang Fude (Chine) début juin, et peut-être d'autres conférenciers étrangers. Tenez-vous informés... entre autres par ce bulletin à lire absolument!

L'équipe de rédaction

Fortuno

Ekzistas homoj, kiujn en la vivo persekutas nekredbla misŝanco: sed al tiuj nepre apartenis Josefo Cafourek. Jam de sia juna junaĝo li havis grandan feliĉon, kaj Fortuno restis al li fidela dum la tuta vivo.

Foje, kiam li estis ankoraŭ suĉinfano, amasiĝis ĉe li preskaŭ ĉiuj ne multnombraj parencoj. La onkloj, kuzoj, avinentoj kaj aliaj specoj de parenkaro diversmaniere grimacis, lispis, movis la orelojn kaj reciproke komunikadis unu al la alia, kiel bela kaj saĝa infano estas la juna Cafourek. Baldaŭ ĉiuj tedis la suĉinfanon Cafourek; klopodante savi sin antaŭ familiaj frenezuloj, li moviĝis iom pli rapide ol ordinare - sed ho ve! Li falis sur la plankon. Kiam post krioj de ektimo kaj revivigo de kuzino oni lin denove levis, diris la plej maljuna onklino: "Sed tiu knabo havas feliĉon! Alia infano mortiĝus - sed li rompis al si ambaŭ manojn!"

De tiu tempo persekutis lin Fortuno ĉiupaŝe. Kiam li aĝis dek jarojn, ekmordis lin foje tuta aro da furioziĝintaj hundoj. La homoj diris denove: Lia feliĉo estas nekredbla! Se li vivus en Afriko, povus lin ja mortigi leono aŭ alia besto!

Fortuno ne forlasis lin eĉ pli poste, kiam li edziĝis. Estas vero - lia edzino forkuris post mallonga tempo kun alia viro, sed tio estis pli bona, ol se li edziĝus al la vidvino Fousek, kiu onidire sian edzon dum lia vivo eĉ batis. Cafourek havis feliĉon eĉ tiam, kiam lia domo tute forbrulis - li ne estis hejme kaj savis tiel do sian vivon. Li ludis en loterio - kaj malgajnis: Fortuno denove savis lin antaŭ akcidento en aŭtomobilo, kiun li certe aĉetus per gajnita sumo. Fortuno ĉiam paŝis kun li kiel hundo sur rimeneto.

Tiel opiniis ĉiuj homoj, dum la opinio de

Jozefo Cafourek estis tute mala. Li estis homo milda, pacama - sed ekaŭdinte vortojn pri sia feliĉo, li tiam ŝanĝiĝis al sangavida rabobesto. Furioziĝinta taŭro estis kompare kun li milda virŝafeto. "Oni ne parolu antaŭ mi pri mia feliĉo aŭ Fortuno, aŭ mi iun mortigos", li freŝdate ja proklamis al la adreso de sia najbaro Meloun. Ili ĉiam vivis en bona najbara harmonio - ĝis la tempo, kiam Meloun distrumpetis tra la urbo parolojn pri

disŝutis cindron antaŭ pordo de Meloun, li povis esti certa ke la sekvantan tagon li havos ĉiujn ansojn surŝmiritaj per marmelado.

Tiel kaj simile amuzis sin ambaŭ najbaroj - sed, stranga afero: nek Cafourek, nek Meloun sentis ĉe tio ian malamon al sia najbaro, kaj tagoj de nerepacigebla batalo alternis kun tagoj de reciproka repaciĝo.

Nun denove estis tempo de mallongdaŭra repaciĝo. Sinjoro Meloun invitis sinjoron Cafourek, ke ĉi tiu lin vizitu. Cafourek akceptis.

Tuj post malfermo de la pordo la venanto ekaŭdis raŭkan voĉon:

"korran bonvenon, Cafourrek!"

"kiel belega birdo," eklaŭdis Cafourek, vidante en la ĉambro grandan papagon.

"Cafourrek, Cafourrek," provokis la birdo.

"Kaj kiel ĝi estas saĝa," daŭrigis sian laŭdon la veninto.

"Cafourrek estas brrruto kaj ignorrranto," respondis la papago.

"Ĉion ĝi ja scias," miris Cafourek.

"Ebrria porrrko," konstatis la birdo.

"Vere, atentema birdo," diris Cafourek kun admiro kaj eksidis ĉe tablo, al kiu invitis lin la najbaro. La papago ankoraŭ kelkajn momentojn raŭkis, sed vidante, ke la viroj ĝin ne atentis, ĝi eksilentis. La najbaroj baldaŭ vigle babilis, trinkis, manĝis - kaj ŝajnis, ke nenio povas rompi ilian amikecon. Kiam ili ĝissate priridis tion, kiel ili estis stultaj en siaj reciprokaj rilatoj, ili decidiĝis forgesi ĉion estintan kaj ekde nun esti nur bonaj najbaroj kaj amikoj. Ĝuste en la momento, kiam ili volis konfirmi sian decidon per manpremo, aŭdiĝis forta voĉo:



senlima feliĉo de Cafourek kaj kiam ĉi-lasto proklamis pri sia najbaro, ke li estas idioto. Post reciprokaj insultoj venis la vico de parencoj de ambaŭ najbaroj, kaj zorge estis lavitaj ankaŭ la kapoj de iliaj prauloj. Sekvis nomoj de ĉiuj vivantaj eĉ pratempaj bestoj, aliaj zoologiaj esprimoj kaj insultoj en ĉiuj mondlingvoj. Poste, ambaŭ kun infana ĝojo ŝanĝis taktikon kaj manieron de reciproka batalo; se Cafourek unutage

Nia ĝenerala kunveno

Ĉi-jare, nia ĝenerala kunsido okazis la 28-an de februaro 2015 en la Centro Jean Vilar en Angers. Nia prezidanto, Pierre Jagueneau, prezentis la aktivaĵan raporton 2014 kaj la projektojn por 2015.

Tre riĉa estis la pasinta jaro je eventoj por nia klubo :

- Akceptado de alilandanoj : niaj gastoj estis Svetlana kaj Firdaus el Taĝikio, juna paro Fabián kaj Fatna el Hispanio, kaj Ana Sonĝanta el Koreio.

- Prezento de Esperanto je diversaj lokoj : gimnazio de Beaupréau, budo "Zoom Roseraie", Festo de la Paco, Festo de civitana transiro (en liceo Le Fresne), en kafejo, agado nomita Café Repaire, liceo Renoir, universitato UCO ("master" studentoj), budo en la Festo de l'Homaro 49, kaj intervjuo de nia prezidanto Pierre ĉe radio RCF.

- Organizado de la Zamenhofa tago

- Starigo de kurso por komencantoj en Municipa Instituto gvidata de Vito Markov.

- Nia sekretario, Laurent Vignaud, ankaŭ laboris por renovigi nian retejon.

La kontojn prezentis nia kasisto, Jeannine Daguin.

Post aprobo de la bilanco, estis prezentitaj distraĵoj :

- Legado de Penseroj far la komencantoj de Vito.



La partoprenantoj entuziasme tintigis la glasojn



Deklamado de pensoj fare de la komencantoj



Prezento de la kanzono "Bona reĝ' Dagober"



La komitato prezentas la jaran raporton

- La konata kanzono "Bona Reĝo Dagober", tradukita kaj rearanĝita de la lernantoj dum konversacia kurso de Jeanik.

- Skeĉo "Malfacila edziĝo" ankaŭ adaptita de nia grupo laŭ rakonto verkita de Vladimir Vana.

Finfine, tiu agrabla kunveno ĉesis post divido de la tradicia reĝkuko.

Verkis Geneviève Gourichon, fotis Maurice Gourichon

Notre assemblée générale

Cette année, notre Assemblée Générale s'est déroulée le 28 février 2015 au Centre Jean Vilar à Angers.

Notre président, Pierre Jagueneau, présenta le rapport d'activité 2014 et les projets pour 2015.

L'année passée fut très riche en événements dans notre club :

- Accueil d'étrangers : nos hôtes furent Svetlana kaj Firdaus du Tadjikistan, un couple d'Espagnols Fabián et Fatna, et une Coréenne, Ana Sonĝanta.

- Présentations de l'Espéranto dans divers endroits : Collège de Beaupréau, stand Zoom de la Roseraie, Fête de la Paix, Festival de la transition citoyenne au lycée du Fresne, dans un café d'Angers pour une action appelée Café Repaire, au lycée Renoir, à l'UCO (étudiants en master), stand à la Fête de l'Humanité 49 et aussi une interview de Pierre Jagueneau par la radio RCF.

- Organisation de la "Journée Zamenhof" régionale.

- Mise en place de cours pour débutants à l'Institut Municipal sous la conduite de Vito Markov.

- Amélioration de notre site internet par notre secrétaire Laurent Vignaud.

Le bilan financier fut présenté par notre trésorière Jeannine Daguin.

Après approbation des comptes, fut donnée la place aux distractions :

- Lecture de pensées à méditer par les élèves débutants de Vito,

- La chansonnette populaire "Le bon roi Dagober", traduite et arrangée par les élèves durant les cours de conversation de Jeanik.

- Le sketch "Un mariage difficile", écrit par Vladimir Vana et adapté par notre groupe.

Enfin cette agréable rencontre se termina par la traditionnelle galette des rois.

Texte Geneviève Gourichon, photos Maurice Gourichon

Grava rendevuo en Lille...

Promesplena universala kongreso !

Post celebrado, en 2005, de la 100-a datreveno de la 1-a Universala Kongreso en Bulonjo-ĉe-Mar (okazinta en 1905), denove, la norda regiono akceptos de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 2015 gravan eventon.

La 100-a UK okazos en la centro de la urbo Lillo. Jam, pli ol 2082 personoj el 75 landoj aliĝis al tiu grandega kunveno. Multaj aktivuloj, bonvoluloj de norda esperantista federacio arde laboras por oferti la plej sukcesan kaj agrablan programon al kongresanoj. Necesas memori ke al la deka UK en Parizo, (kiu ne okazis pro la deklaro de la unua mondmilito) aliĝis 3739 personoj kiuj deziris kunveni kaj renkonti Zamenhof.

Do, kiom ni ĉeestos en Lillo por la centa UK ?...

Nordo de Francio preparas la UKon kaj cerbumas por diskonigi Esperanton. Ankaŭ en aliaj regionoj, oni aktiviĝas pri tio. Ekzemple, korusanoj, muzikistoj, kantemuloj, renkontiĝis aŭ renkontiĝos cele kunkantadi surstrate kaj sur la granda Lilla placo. Ni citu, interalie, la projekton de La Kompanoj (<http://lakompanoj.free.fr/>) el Bordojo sub la gvidado de Marcel Redoulez, kaj la akordionisto Fabrice Morandeu, alinome Famo, kiu provkantigas kantemulojn en Parizo, Le Mans, eĉ ... en Angers la 21-an de marto !

Geneviève Gourichon

**100^e Universala
Kongreso de Esperanto**
Lillo (Lille), Francio
25 julio – 1 aŭgusto 2015
Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj

De la unua... ek al la centa!

 www.lille2015.fr 

Un congrès universel très prometteur !

Après avoir fêté, en 2005, le centenaire du 1er congrès mondial de Boulogne-sur-Mer (en 1905), la région du Nord accueillera de nouveau un événement important : Le 100^{ème} Congrès Universel à Lille du 25 juillet au 1er août 2015. Déjà, plus de 2082 personnes de 75 pays se sont inscrites pour cet important rendez-vous. De nombreux militants et bénévoles de la fédération espérantiste du Nord travaillent avec ardeur pour offrir le programme le plus agréable et le plus réussi

possible à tous ces congressistes. Rappelons que le 10^{ème} Congrès Mondial prévu à Paris et annulé à cause de la déclaration de la première guerre mondiale, comptait 3739 inscrits désireux de se réunir et rencontrer L.L.Zamenhof.

Combien serons-nous à Lille pour le 100^{ème} ... ? Le Nord prépare le congrès mondial et se creuse la tête pour diffuser la connaissance de la langue Espéranto.

Dans d'autres régions, on s'active. Choristes, musiciens et amateurs de chant, se sont rencontrés ou se rencontreront dans le but de chanter ensemble sur les rues et la grande place de Lille. Entre autres, citons le projet des Kompanoj (<http://lakompanoj.free.fr/>) de Bordeaux, sous la conduite de Marcel Redoulez et l'accordéoniste Fabrice Morandeu, nommé Famo, qui fait répéter les amateurs de chant à Paris, le Mans, et même à ... Angers !



Le Grand-Palais à Lille

Geneviève Gourichon



Aperitivo estas ĉiam okazo por babili

Simpatia renkontiĝo okaze de la "Zamenhofa Tago"

Dimanĉon 14an de decembro 2014 okazis en Angers la tradicia «Zamenhofa Tago» kiu festas la naskiĝan datrevenon de la kreinto de Esperanto. Estis okazo por la anĝeva grupo akcepti la esperantistojn el najbaraj departementoj. 54 partoprenantoj kunvenis en salono Darwin kie ili estis akceptitaj, ekde la mateno, per varmaj trinkaĵoj kaj kukiaĵoj.

Post mallonga enkonduko far Pierre Jagueneau kaj Jeanik Marolleau, oni spektis la filmon «Esperanto», reĝisoritan kaj eldonitan de SAT-Amikaro. Post la projekciado, sekvis debateto en Esperanto, gvidata de Vito Markovo. Aperitivo estis servita en la salono kaj sekvis kunmanĝado.

Ekspozicio estis starigita pri la esperantista agado dum la unua mondmilito, helpe de klarigaj tabuloj, malnovaj libroj kaj dokumentoj. Krome, Christian Rivière prezentis siajn skribajn verkojn kaj Vito Markovo la eldonaĵojn de SAT-Amikaro.

La posttagmezo estis unue animata de Jacques Lambour kiu, per regiona



Jacques Lambour



Fabrice Morandau

dialekto, rakontis historietojn kaj poemojn fare de Gaston Couté. Oni povis senti la streĉan emocion kiu ŝvebis el tiu eksterordinara rakontanto. Poste, Fabrice Morandau, alinome «Famo», kun sia akordiono, proponis al la grupo kunkanti belegajn popularajn kanzonojn kiujn ĉiu povis kunkanti laŭplaĉe. Tiu sperto estos vere refarinda. Cetere, Fabrice kaj La Kompanoj preparas muzikan manifestacion okaze de la universala kongreso en Lille, en julio 2015.

Por altigi tiun vivoplenan kunvenon, oni tintigis la glasojn. Konvenas nun varme danki ĉiujn volontulojn (ili sin rekonos...) kiuj arde laboris por sukcesigi tiun festotagon!

Ĝis baldaŭ al ĉiuj!

Réunion conviviale pour la "Journée Zamenhof"

Le dimanche 14 décembre 2014 s'est déroulée à Angers la traditionnelle "Journée Zamenhof" qui marque l'anniversaire de la naissance de l'initiateur de l'espéranto. Ce fut l'occasion pour le groupe angevin de recevoir les espérantistes des départements voisins. 54 participants se sont réunis salle Darwin où ils furent accueillis dès le matin avec boissons chaudes et pâtisseries.

Après une courte présentation de Pierre Jagueneau et Jeanik Marolleau, on a pu regarder le film "Esperanto", réalisé et édité en DVD par SAT-Amikaro. La projection fut suivie par un mini-débat animé par Vito Markovo en espéranto. Un apéritif était ensuite servi dans la grande salle avant que chacun s'installe pour déjeuner.

Une exposition avait été dressée, relatant l'action des espérantistes pendant la guerre 14-18 avec panneaux explicatifs, livres et documents anciens. En outre, Christian Rivière présentait ses oeuvres écrites et Vito Markovo les éditions de SAT-Amikaro.

L'après-midi fut d'abord animé par Jacques Lambour qui conta en patois des histoires et poèmes de Gaston Couté. On pouvait sentir l'émotion à fleur de peau qui émanait de ce conteur formidable. Ensuite Fabrice Morandau, dit "Famo", proposa à l'assemblée de chanter avec lui, accompagné de son accordéon, de très belles chansons populaires que chacun put entonner à sa guise. Cette expérience sera à renouveler à coup sûr. D'ailleurs, Fabrice prépare une manifestation musicale pour le congrès mondial à Lille en juillet prochain.

Le verre de l'amitié termina cette journée pleine de partage et de convivialité.

Il convient ici de remercier chaleureusement tous les bénévoles (ils se reconnaîtront...) qui ont oeuvré ardemment à la préparation et à la réussite de cette journée!

A bientôt tous!

Sekvo de la paĝo 1

"Cafourrek ! Forrrtuno ! Forrrtuno !"

Cafoure kialiĝis, poste ruĝiĝis kaj ĵetegis sin direkte al la birdo. Ĝi forflugis - sed ne forkuris Meloun, kiu intencis ĉesigi la agadon de sia najbaro. Meloun ion kriis, sed Cafoure kaptis lin ĉe la gorĝo kaj komencis lin strangoli. Ili raŭke spiris kaj ĝemaĉis en sovaĝa lukto. Klopodante elfjeti unu la alian tra la pordo, ili elflugis kune kiel rakedo kaj ruliĝis laŭ la ŝtuparo al pli malsupra etaĝo. Cafoure denove havis feliĉon - li rompita al si nur brakon kaj kvin ripojn.

Post tempo oni pritraktis la aferon antaŭ juĝeja tribunalo. Dum enketado pri la okazintaĵo oni alportis la papagon de sinjoro Meloun, kiu post admono de la juĝisto kriis tute klare :

"Forrr tuno ! Forrr tuno !"

La tribunalo havis senduban pruvon, ke sinjoro Meloun ne instruis sian papagon moki al sinjoro Cafoure, kiel ĉi tiu asertis,

sed ke la birdo kriis ion tute alian. La aferon klarigis sinjoro Meloun : la papago estas iom tro parolema - kaj vidante, kiel sinjoro Cafoure kaj Meloun manĝas, ĝi kriis, ke ili manĝas ĉiam multon. Laŭ la opinio de la papago estis tiam forkonsumita la tuta tuno de manĝaĵo - do, for tuno ! Sinjoro Meloun ne povis klarigi la aferon al sinjoro Cafoure surloke, ĉar ĉi tiu komencis lin strangoli.

La tribunalo kredis al sinjoro Meloun, kaj tiel pro faritaj vundoj kaj detruo de fremda loĝejo sinjoro Caroufek estis arestita. Feliĉulo ! Fortuno lin ne forlasis - oni kondamnis lin nur je du jaroj.

Vladimir Vana

Eltirita de la libro : "Rakontoj ne nur ŝercaj"

*Tiu libro estas aĉetebla ĉe : Kava-Pech, Anglická 878, CZ-25229 Dobříčovice, Ĉeĥa Respubliko.
 Ret-poŝtadreso : info@kava-pech.cz
 Ret-paĝo :*

<http://www.kava-pech.cz/book-rakontoje-esperanto.html>

Ni malĝoje eksciis pri la forpaso de Pierre BABIN (2-an de marto 2015). Kun sia edzino kaj sia familio, li longtempe estis en la vivkerno de la esperanta Kulturdomo Greziljono (1952-1998). Li estris ĝin (1966-1992). Pluraj anĝervanoj bone konis lin dum tiu periodo, okaze de staĝoj aŭ regionaj renkontoj. Interalie, li estis redaktoro de la revuo «Kulturaj Kajeroj», aŭtoro de la lernolibro «Por la praktikantoj» kaj prezidanto de Franca Esperanto-Instituto. Pliaj informoj estas videblaj ĉe la greziljona retejo : gresillon.org

Nous avons appris avec tristesse le décès de Pierre BABIN (2 mars 2015). Il fut longtemps au cœur de la vie de la Maison culturelle de l'Espéranto -Gresillon- (1952-1998) avec son épouse et sa famille. Il en a assuré la direction (1966-1992). Plusieurs angevins l'ont bien connu durant cette période lors de stages ou de rencontres régionales. Il a été notamment rédacteur de la revue «Kulturaj Kajeroj», auteur du manuel «Por la praktikantoj» et président de l'Institut français d'Espéranto. Plus d'informations sont visibles sur le site de Gresillon : gresillon.org

Nova loĝejo en Moskvo por Esperantistoj

Malmultekosta loĝeblo en Moskvo - por E-parolantoj.

Moskvo estas belega, admirinda, superba urbo, sed bedaŭrinde unu el la plej multekostaj lokoj en Eŭropo. Tamen danke al la malmultekostaj flugoj, hodiaŭ oni jam povas relative favorpreze veturi al ĝi, kaj ankaŭ la dorsosakaj turistoj povas trovi tranoktejon - ĉefe, se ili scipovas Esperanton.

En la retlisto de IKEF ni legis la informon, ke rusa esperantisto malfermis mini-pensionon, transformitan el loĝejo, kie ankaŭ eksterlandaj turistoj estas bonvenaj - eble kun malgranda komforto, sed kun vere malaltaj prezoj, laŭ la tieaj mezuroj.

Anatoli Gulidov skribis:

Saluton, geamikoj ! Mi gratulas ĉiujn okaze de novjara festo, deziras en nova 2015 jaro sukcesojn en laboroj kaj feliĉon en vivo.

Nun, antaŭ la novjaro ni malfermas mini-hotelon pretan por akcepti 24 gastojn. Tio okazas danke al kunlaboro de esperantistoj de diversaj landoj. Pri nomo ni ankoraŭ ne decidis, proponitaj



nomoj estas "Esperanto" kaj "Mondo amika". Ni volas kunlabori en multaj terenoj. Ni volas akcepti gastojn de vi kaj sendi niajn turistojn al vi, kunlabori en komerco kaj edukado, ktp.

Mi pretas akcepti 1-2 esperantistojn de aliaj urboj aŭ landoj por labori kun ni en la hotelo, ni atendas kontraktojn pri kunlaboro kun turismaj societoj kaj

agentejoj por interŝanĝi gastojn. Bedaŭrinde ne ekzistas ankoraŭ nia retpaĝo en Esperanto, sed baldaŭ ! Ni povas akcepti ĉe ni individuojn de ĉiuj landoj ; por vi estos turisma invitilo kaj nia taksio atendos vin en flughaveno. Mi dankas ĉiujn kunlaborantojn, ĝis revido !

Anatoli Gulidov

rete : tung88@mail.ru
tel : +79035943808
<http://hostel.ridder.ru>
skype : anatoli.ridder

Fonto :

László Szilvási, Lingvo-Studio, L.S.
www.eventoj.hu

Ni ludis

N° 18

1	PALINDROMO	A	PAKIDERMOJ
2	ARANEO - KUK	B	AROMO - OO
3	KOM - KR - D - LI	C	LAMP - IKTER
4	IMPERIESTR	Ĉ	IN - ETN - OMO
5	DO - TOSTI	D	NEKROFOR
6	INFORMIL	E	DORISO - OER
7	ROK - OODK	F	DETROJTO
8	MOTOROJ	G	OK - SIMO - IS
9	EM - ETIOL	Ĝ	MULT - IDIOT
10	JARO - ROSTI	H	OKIRELK - LI

Ni ludas

Horizontale :

- Ili montras la dividojn de la jaro.
- La ekstera epitelio (sf) - La du seksoj !
- Brando aŭ likvoro (sf) - Bruna aŭ blanka mamulo (sf).
- Unuo de maso (sf) - Vivulo tre malgranda (sf).
- Sicilia vulkano (sf) - Haŭtmalsano (sf).
- Ĝi ne apartenas al pastraro - Zigoto.
- Inklino je (sf) - Kiu estas interna al iu (sf).
- Prezentanta klaran aspekton - Grandega kvanto (sf).
- Nekonatulo ! - Rapidaj dancoj.
- Jatagano sen vokaloj - Franca rivero.

Vertikale :

- Francia insularo en Hinda Oceano.
- Sametaĝa loĝejo (sf).
- Longa kaj teda elnomado (sf) - Ĝi portas foliojn (sf).
- Nederlanda fromaĝo (sf) - Ĝi demandas pri la eco, naturo aŭ speco.
- (inv) Alpa varma vento (sf) - Malmulte.
- Tro trinki (sf) - Granda kvanto (sf).
- Havi seksan inklinton al iu (sf) - Sentonala.
- Tutaĝo de ĉio, kio ekzistas.
- Fabela giganto (sf) - (inv) Japano dramo - Kapo de onagro !
- Morfemo kiu asertas verecon - Asocio por la junaj Esperantistoj.

N° 19 (sf) : sen finaĵo (inv) : inverse

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1										
2										
3										
4										
5										
6										
7										
8										
9										
10										

QUELQUES DATES A RETENIR...

3 - 10 avril : Semaine Internationale de Printemps à Winterberg (Allemagne)

1er - 3 mai : Congrès Espagnol d'espéranto à Cullera (Valencia, Espagne)

13 - 16 mai : 3ème Colloque mondial sur l'enseignement de l'espéranto à Neuchâtel-La Chaux-de-Fonds (Suisse)

22 - 25 mai : 92ème congrès allemand d'espéranto à Hameln (Allemagne)

5 - 7 juin : 110ème congrès écossais d'espéranto à Helensburgh (Écosse)

17 - 25 juillet : 48ème Conférence Internationale d'ILEI (enseignants) à Oostende (Belgique)

25 juillet - 1er août : 100ème Congrès Mondial d'Espéranto à Lille (déjà plus de 2000 inscrits !)

25 juillet - 1er août : Congrès International d'enfants à Villeneuve-d'Ascq

8 - 15 août : Congrès de SAT à Nitra (Slovaquie)

2 - 9 août : Congrès de TEJO (assoc. mondiale jeunes) à Wiesbaden (Allemagne)

15 - 22 août : 19èmes rencontres internationales de Plouézec (Côtes-d'Armor, France)

22 - 29 août : Congrès italien d'espéranto, à San Benedetto del Tronto (Italie)



Maison Culturelle de l'Espéranto Château de Grésillon

Programo 2015 www.gresillon.org/agendo

17/25 aprilo

PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kun Zs. Korody, Ch. Chazarein, M. Quenut

gresillon.org/printempas

25/26 aprilo

PRINTEMPaS, internaciaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1)

gresillon.org/printempas

06/13 julio

Ferioj - Familioj - Interŝanĝoj RERS

gresillon.org/s1

20/25 julio

Kasteloj de la Luaro, UK-antaŭkongreso

gresillon.org/s2

01/08 aŭgusto

Lingvoj kaj kulturoj de la mondo

gresillon.org/s3

08/16 aŭgusto

Festa Semajno por infanoj kaj familioj

gresillon.org/s4

17/25 oktobro

AŬTUNE, lingva seminario kun Christian Rivière k.a.

17/25 avril

PRINTEMPaS, cours intensifs avec Zs. Korody, Ch. Chazarein, M. Quenut

gresillon.org/printemps

25/26 avril

PRINTEMPaS, examen international d'espéranto (B1, B2, C1)

gresillon.org/printemps

06/13 juillet

Vacances - Familles - Échanges RERS

gresillon.org/s1fr

20/25 juillet

Châteaux de la Loire avec guide espérantophone

gresillon.org/s2fr

01/08 août

Langues et cultures du monde

gresillon.org/s3fr

08/16 août

Semaine Festive pour enfants et familles

gresillon.org/s4fr

17/25 octobre

AŬTUNE, séminaire linguistique avec Christian Rivière



adreso :

MCE, Grésillon, St. Martin d'Arce, 49150 Baugé-en-Anjou

telefono :

02.41.89.10.34

retpoŝto :

kastelo@gresillon.org

Nous contacter

Centre Culturel Angevin d'Espéranto

41 rue Pierre Melgrani 49000 Angers

Tél. 02 41 73 17 97 - Courriel : info@esperanto-angers.fr

Vous informer

www.esperanto-angers.fr

www.esperanto-france.org, www.esperanto-jeunes.org

www.uea.org, www.esperanto.net